

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

N-ro 26, 3. Aprilo 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

Admirinda Salzburgo.

„Kiu ne vidis la tropojn, rapidu al Salzburgo, por ekvidi la plenecon kaj belecon de la n-turo gaje ĉirkaŭnata la urbon.“
(Imperiestro MAX de MEXIKO.)

Salzburg, la ĉefurbo de la lando Salzburg (parto de Aŭstrio), estas lokita inter du krutaj montoj, la Mönchsberg (monahmonto) kaj Kapuzinerbergo, levigantaj el la ebenaĵo. Meze tra la urbo fluegas la verda Salzach, el kiu oni pli frue ellavis oron. Tiom belege lokita estos la urbo, ke la fama Aleksandro de Humboldt nomis ĝin unu el la tri plej belaj urboj de la mondo.

Jam la keltoj fondis ĉi tie la loĝejon „Juvavum“, kiun pli malfrue eksposedis la romanoj. En la mezo de la 6-a jarcento la S-ta Ruperto fondis ĉi tie ĉefepiskopejon. De tiu ĉi tempo, Salzburg ĉiam pliriĉiĝis kaj fariĝis unu el la plej eminentaj urboj en la mezepoko.

Ĝis la tempo de niaj praaĵoj Salzburg estis ankoraŭ ĉiam ĉirkaŭita de muregoj, kaj eĉ nun oni ankoraŭ vidas, tramigrante la malnovan parton de la urbo, muregrestojn, pordegojn kaj turegojn. Tiamaniere en Salzburg oni trovas felice ligitaj la ecojn de antikva kaj novtempa urbo.

Trairante la malnovan parton de la urbo, oni bone povas imagi, ke oni vivas en mezepoko. La grizaj domoj kun la ornamitaj, eĉ ofte fortikigitaj pordegoj, disigitaj nur per mallarĝaj stratetoj, rigardas severe al la migranto, kaj vespere oni senvole ĉirkaŭrigardas, ĉu ne eliras iu koboldo el unu el la anguloj aŭ pordegoj. Nur la novtempa asfalta pavimo montras al ni, ke ni tramigras novtempan urbon.


Kiel pli frua universitata urbo kaj multcentjara sidejo de artemaj kaj pompemaj ĉefepiskopoj, Salzburg estas riĉega je belegaj artemontoj, precipe je preĝejoj. La plej grava el tiuj ĉi estas la katedralo, kiu similas al la Petro-preĝejo en Romo. Tiu ĉi impona katedralo, nomita la „Dom“, povas enhavi pli ol 12000 personojn samtempe. Ĝi estas konstruita el konglomerat-ŝtonoj, escepte la fronto kaj la 80 m altaj turoj, kiuj estas el flaveta marmoro. La plej granda kaj impona organo*) de germanlandoj akompanas la diservon. Tre belaj kaj vidindaj estas ankaŭ la aliaj 25 preĝejoj kiel la S-ta Petro-, Franziskaner-, Trinitata preĝejo ktp. Kaŭze de la riĉeco de preĝejoj oni jam nomis Salzburg „la germana Romo“.

Unu el la specialaĵoj estas la kastelo „Hohensalzburg“ (Alta Salzburgo) konstruita en la jaro 1066 sur la 142 m alta „Mönchsberg“ aŭ „Kastel-monto“. De ĝiaj turoj oni vidas en la nordo ĝis la „bohema arbaro“ kaj en oriento, sudo kaj okcidento nia okulo ripozas sur la mont-eguloj de la „Tauern“, „Tännennmontaro“ ktp. Tre interesa estas la tiel nomataj „princo-ĉambroj“ en la kastelo, kiujn, en tempoj militaj, devis provizore enloĝi la episkopoj. Ili estas tre riĉe meblitaj kaj ornamitaj. Migrante sur la dorso de „Mönchsberg“, kies rektaj deklivoj limigas la okcidentan kaj duone la sudan flankon de la urbo, la okulo estas gojigata per la plej diversaj aspektoj. Ne forgesi pli alta ol la „Mönchsberg“, kaj kiu limigas je la dekstra bordo de la „Salzach“ la urbon.


Komprenibile en urbo, tiom riĉa je naturbelajoj, regita ĉiam de artemaj princoj, evoluis grandega artivivo. La riĉeco je diversaj mineraloj, je kalk-ŝtono, marmoro**), oro, kupro, fero, smaragdoj ktp. akcelis la ĉiuspecajn artojn, kies postsignojn ni ankoraŭ nun admiras. Belegaj palacoj, konstruitaj de la pompemaj episkopoj, revokas la pli fruajn tempojn, kaj, tramigrante la faman „Mirabell-gardenon“, oni tute ne mirus, se oni renkontus fraŭlinojn kun krinolinoj aŭ gracie vestitajn amantojn kun pudritaj perukoj.

Sed la plej valora, kion posedas Salzburg, estas la honoro, ke ĝi povas nomigi sin la naskiĝurbo de Mozart. Sankta tero estas por ĉiu aŭdanta homo la tero, kiu naskis la plej grandan majstron de la muziko, kiun posedas la homaro. Ankaŭ Haydn, kvankam ne naskite ĉi tie, verkis siajn plej grandajn muzik-poemojn en Salzburg. La belegeco de la salzburga naturo estas revokita, trudukita muzike en la verkoj de ĉi tiuj majstroj.

Tamen Salzburg estas ne nur muzika centro, sed ankaŭ la hejmurbo de multaj aliaj famaj artistoj kaj sciencistoj. Theopastus Paracelsus (medicinisto), Makart, Rofhmayer kaj Hubert Sattler (pentristoj) Multaj fremdaj



Tutaspekto.



Urba Domo.



Kastelo Hohensalzburg.

artistoj trovis ĉi tie, per la salzburga naturbeleco, sian vojon, sian celon kaj povon. Tiamaniere oni povas diri, ke Salzburg estis de ĉiam ejo de arto kaj kulturo, kaj ĝi ankaŭ nun pravas tion. Kiel sidejo de la Muzik-Altlernejo „Mozarteum“ ĝi estas konata tiel en Usono kiel en Ĥinio.

Salzburg, inda esti vizitota de ĉiu, devas esti traveturota de la vizitantoj al la Graza Katolika Kongreso Esperantista, kaj ankaŭ de multaj vizitantoj al la Praga Kongreso, kaj mi invitas ĉiujn videmulojn resti kelkajn horojn en ĝi kaj pripensi, ĉu Salzburg ne estus inda kaj bela urbo por venonta kongreso. F. H.

Kiel la finnoj atingis sian unuan gravan venkon.

El la lasta numero de „Esperanta Finnlando“ ni ĉerpas sekva-

ntan interesan ĉapitron pri la antaŭhistorio de la finna parlamenta decido. Jam en aŭtuno 1918 dekdek personoj, inter ili kelkaj profesoroj, doktoroj, docentoj kaj rektoroj, peticiis ĉe la ministerio de publika instruado pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Kaŭze de baldaŭ farita idista propono, ke Esperanto ne estu subtenata, ĉar oni ne povas scii, ĉu eble Ido aŭ angla lingvo konkuros kun ĝi, kaj ĉar la administracio de publika instruado ne volis decidi pri la afero, la ministro petis ekspertizon de tri universitataj profesoroj, Setälä (finna lingvo kaj literaturo), Ramstedt (altaja lingvistiko) kaj Wallensköld (latinida lingvistiko). Ĉar la lastenomita estas amiko de Ido kaj Ramstedt esperantisto, la rezolucio ne povis fariĝi unuanima kaj decida. Ĉefe sub influo de profesoro Setälä la profesoroj fine faris kompromison, rezolvante ke la mondlingva movado estas subteninda de la ŝtato ĉiam kiam ĝi aperas sub formo de serioza laborado, sendepende de tio, ĉu ĝi ĉelas Esperanton aŭ Idon. Ĉi tiu rezolucio estis tamen donata tiel malfrue en aŭtuno 1919 al la ministerio, ke ne estis eble tiri el ĝi iajn sekvojn por la budĝeto de 1920.

Baldaŭ post tio okazis ŝanĝo de registaro. Parte pro tio, ke la instrua ministro Soinen, varma subtenanta de nia ideo kaj nuntempe jam esperantisto „ĝis ostoj“, estis anstataŭigata per indiferentulo — se ne kontraŭulo — de Esperanto, parte ĉar la nova registaro estis ĝenerale de malpli progresema koloro, ni perdis ĉiujn esperojn atingi registaran proponon pri subvencio al Esperanto. Ni do decidis turniĝi al la parlamento, spite tio, ke la elektita vojo estis multe pli malfacila kaj danĝera, ol tiu per la registaro: ne estas facile nuntempe aŭdoni al la elspeza parto de la budĝeto, kion la registaro ne proponis. Kaj kiel antaŭvidi la opinion de 200 parlamentanoj de diversaj partioj! Kiel neutraligi la agadon de la idistoj inter ili?

Interlime la Helsingforsaj idistoj proponis al ni komunan agadon en la afero. Oni petus subvencion dividotan laŭ nia interkonsento. Nu, laŭ la opinio de la profesoroj, paca batalo inter

ni komunan agadon en la afero. Oni petus subvencion dividotan laŭ nia interkonsento. Nu, laŭ la opinio de la profesoroj, paca batalo inter

*) Ĝi estas konstruita de la fama salzburga organ-konstruisto Mauracher kaj havas pli ol 6000 fajfilojn. Ĝi estas la plej granda en Eŭropo.

**) La salzburga marmoro estas aŭ flava aŭ viand-ruĝa kun flavaj makuloj. Ĝi estas tre konata kaj ŝatata en la tuta mondo, kaj antaŭ la milito la salzburga marmoro-industrio eksportis multegon da ĝi al Usono kaj aliaj landoj.

esperantistoj kaj idistoj devis decidi pri la afero. Per komuna peticio ni fariĝis solidaraĵ kun la idistoj. Kaj batalo kun solidareco malbone harmonias. Ni rifuzis.

Ni sukcesis trovi inter la parlamentanoj de diversaj partioj subtenantojn de nia ideo, kiuj estis pretaj subskribi peton de 35 000 marka subvencio al E. A. F.

Intertempe kelkaj parlamentanoj pro iniciato de la idistoj faris peticion pri 50 000 marka subvencio al internacilingva movado, el kiu sumo la socioj esperantistaj kaj idistaj povus ricevi subtenon per la instrua ministerio ĉefe por edukado de instruistoj de helplingvo kaj por eldono de helplingva literaturo.

La Kultura komisiono de la parlamento, kiu unua devis pritrakti la demandon, decidis proponi subvencio por internacilingva movado de 40 000 markoj, dividotan inter esperantistaj kaj idistaj organizantoj laŭ la amplekso de ambaŭ movadoj. Al ĉi tiu rezolucio kelkaj anoj de la komisiono esprimis rezervacion, laŭ kiu oni aŭ devus duonigi la sumon aŭ tute ne doni subvencio al la movado.

Kiam la afero venis al la Financa komisiono, tie troviĝis kelkaj tre fervoraj kontraŭstarantoj de la partigo de la subvencio. Kvankam ili ne estis esperantistoj, ili (kiel samspiritaj komercistoj) konsideris sensece kaj malprudente arte akceli skismon en la kampo. Se oni donos subvenciojn, oni donu ĝin nur al la pli forta movado, por ke ĝi kiel eble plej rapide venku ĉiujn konkurantojn, „verŝajne naskitajn per personaj ambicioj kaj intrigoj“.

En la voĉdono de la unua tralego de la ŝtata budĝeto oni 1-e decidis subvencii nur unu movadon, 2-a decidis, ke Esperanto meritas la subvenciojn, 3-e decidis, ke 25 000 markoj devas sufiĉi kaj 4-e . . . rifuzis la tutan subvenciojn per plimulto de unu voĉo el ĉ. 20 komisionanoj. En la dua tralego de la budĝeto la favoroj de Esperanto venkis la indiferentulojn kaj kontraŭstarantojn per unu voĉo. Tiel la Financa komisiono do definitive proponis al la parlamento, ke Esperanto-Asocio de Finnlando ricevu ŝtatan subtenon de 25 000 markoj. Kaj, kiel ni raportis, ĉi tio fariĝis decido de la parlamento.

Tiel ni atingis nian unuan gravan venkon.

Esperanto en Malmö.

Parolado al 1200 senlaboruloj.

Neniam antaŭe estis tiom granda la intereso por Esperanto en Malmö (Svedio). La Klubo Esperantista okazigis estrarkunvenon la 13. marto. Tiam da laboro troviĝis en la klubo, ke necesis okazigi eksterordinaran kunvenon la 17. marto.

La kurso en la junul-unuigo „Caroli“ bone progresas; partoprenas regule 30 personoj. La 16. marto paroladis s-anoj Erik Andersson kaj M. Carlsson en alia junul-unuigo, kie oni tiel entuziasmiĝis por Esperanto, ke oni plene decidis igi Esperanton sia plej ĉefa laborcelo. Estis samtempe bela ekspozicio kaj okazis kantoj en Esperanto. Nun s-ano Carlsson gvidas 20-p. kurson.

La plej granda sukceso okazis la 23. marto, kiam peite alvenis nia malnova kaj lerta s-ano G. H. Backman por fari propagandan paroladon al la senlaboruloj en Malmö. Antaŭ sufiĉe unika publiko, granda je 1200 gehomoj, li bele kaj konvinkite montris, kia estas Esperanto. Disdonitaj ŝlosiloj estis tuj rigardataj, kaj oni fondis komitato por planigo de la okazantoj kursoj. La komitato konsistas el tri bonaj esperantistoj, sur kies listoj por kurs-partopreno sin notis 130 personoj. Jam estas videbla brilo de Esperanto. Antaŭen al la venko!

(E. A.)

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio. (19-a daŭrigo.)

„Kelkaj homoj“, murmuris Dima, sin forturnante, „estas obstinaj, kiel virbovoj en Loziŝci. — Al ili pli plaĉas, ke oni ĵetu al ili fruktrestojn en la vizaĝon.“

„Jen vi jam insultas Loziŝci'on, kie vi naskiĝis“, diris Mateo kaj eksilentis. Dima ankoraŭ ion murmuris, sin turnis sur alian flankon, ekspiris kaj ekparolis per mallaŭta, iom flatema tono:

„Cu penvolaras paroli kun Berko? Jen tiu irlandano! li insultomis tute senkaŭze . . . Hodiaŭ mi eksciis, kion signifas Tammany Hall kaj kiel oni vendas sian voĉon. Tute simpla afero! Jen . . . Ili ĉi tie elektas por si urbestron, juĝistojn kaj aliajn oficistojn. Nu, kompreneble, ĉiu deziras havi pli superan lokon . . . Tial ili pagas, por ke oni voĉdonu por ili . . . Iu kolektas dek voĉojn, alia dudek . . . Cu vi aŭskultas, Mateo?“

Sed, kvankam Mateo nenon respondis, li daŭrigis:

„Laŭ mia opinio, tio estas justa; se oni deziras havi profiton, oni devas pagi . . . Kaj krom tio . . .“

Dima daŭrigis flustris:

„Ili diras, tiu irlandano kaj la hebreo, de kiu mi aĉetis la vestojn, ke ankaŭ ni povas . . . Certe, niaj voĉoj ne estas veraĵ, tamen ili havas sian valoron . . .“

Mateo jam estis respondonta ton signifoplenan, sed el unu lito aŭdiĝis kolera ekkriso de la amerik-

Ĝenerala kunveno de Litova Esperanto-Asocio.

La 27-an de februaro en urbo Kaunas okazis ĝenerala kunveno de Litova Esperanto-Asocio. Ĉeestis 55 membroj kaj kelkaj gastoj. La kunvenon gvidis s-ro P. Medem, kiu raportis pri la agado de Asocio kaj pri esperantista movado en Litovio. S-ro Gaigalas raportis pri agado de la esperantistoj en urbo Siauliai, kie multaj homoj tre ekinteresiĝis pri Esperanto. En Siauliai ekzistas esp. kursoj kun 72 lernantoj.

S-ro A. Klimas parolis pri la neceso eldoni esperantajn lernolibrojn kaj vortarojn por litovoj; kaj raportis, ke estas jam preta (en manuskripto) esperanta-litova vortaro, enhavanta ĉirkaŭ 10 000 da esperantaj vortoj kaj estas preparata litova-esperanta vortaro, kiu enhavas ĉirkaŭ 30 000 da vortoj. Krom tio estas preparata la lernolibro.

S-ro Mačernis proponis elekti komisionon, kies tasko estu zorgi pri la eldono de la lernolibroj kaj vortaroj. En tiun ĉi komisionon estis elektataj: s-roj P. Medem, Tijnaitis, Mačernis, A. Klimas kaj prel. A. Dambrauskas.

S-ro P. Medem sciigis sian ekŝigon el la komitato de la Asocio por multaj okupoj. La kunveno kun bedaŭro alprenis tiun ekŝigon kaj elektis en la Komitato anstataŭ li s-rojn A. Klimas kaj Tijnaitis.

Prelato A. Dombrauskas diris kelkajn vortojn pri la neceso de esperanta gazeto por baltaj (baltikaj) landoj. Gazeto povus eliri en Litovio aŭ Latvio.

En la komenco de la somero oni intencas kunvoki la kongreson de esperantistoj el tuta Litovio.

Esperanta Festo en Saaz.

Sabaton la 12-an de marto okazis la fondaĝa festo de la Saaz'a Esp. Unuigo en la salono de la pafista domo. Preskaŭ 1000 personoj partoprenis en la festo, inter ili 80 fremdaj geesperantistoj el la tuta ĉeĥoslovaka respubliko, eĉ unu el la najbara Saksujo (s-ino Camilla Fürth el Dresden).

La granda ĉefsalono, kiu estis vere internacie ornamita per esp. steloj kaj grandaj flagoj diversnaciaj, preskaŭ ne sufiĉis por la amaso de la gastoj.

S-ro prof. Süßer, direktoro de la urba esp. lernejo, faris la salutparoladon, kore bonvenigis la reprezentantojn de la esp. prujpoj Eger, Karlsbad, Königsberg, a. d. Eger, Komotau, Teplitz, Dux, Oberlittesdorf, Briix, Tetschen, Bodenbach, Warnsdorf, Leitmeritz, Michelob, Podersam, Praha kaj Dresden, kaj varme dankis al la urba magistrato de Saaz pro ĝia akcelo de la esp. afero kaj al s-roj Stupka, Wagner-Bezdiek, Trägner kaj Waller pro ilia fervora pionira laboro por Esperanto.

Post la salutparolado okazis la elekto de la estraro: s-ro Süßer (prez.), d-ro Nohel (vicprez.), Stupka (sekr.), Wagner (kas.) kaj kelkaj pliaj ĝesinjoroj.

Poste f-ino Ilse Süßer parolis Esp. prologon, 90 gekantistoj kantis la himnon, estis farataj seriozaj kaj humorplenaj deklamoj, solokantoj, kantoj kun liuta akompano ktp. Danco post noktomezo finis la belan feston.

Inter la ĉeestantoj oni rimarkis multajn eminentulojn de la urbo.

Dum la oficiala fondaĝa soleno, la vicprezidanto d-ro Nohel transdonis al s-ro prof. Süßer arte faritan diplomon kiel dankosignon de la saazaj esperantistoj pro la servoj faritaj de li al la esp. movado.

ano. Dima komprenis nur unu vorton „devil“ kaj konjektis, ke oni sendas ilin ambaŭ al la diablo, ĉar ili malhelpas dormi . . . Li kunvolviĝis kaj glitis sub la likovrilon.

Dume supre, en malgranda ĉambreto, kune dormis Roza kaj Anna.

Kiam ili estis enlitiĝontaj, Roza ekrigardis Anna'n kaj demandis:

„Eble al vi estas malagrabla dormi en la sama lito kun hebreino?“

Anna ruĝiĝis kaj konfuziĝis. Ŝi deziris preĝi, elprenis sian sanktan pentrajeton kaj volis alkruci ĝin en angulo, kiam la paroloj de Roza rememorigis al ŝi, ke ŝi estas en hebreo domo. Ŝi staris hezitante kun la sanktaĵo en la mano. Roza komprenis:

„Vi volas preĝi kaj mi vin malhelpas. Ĉu mi devas foriri?“

Anna konfuziĝis ankoraŭ pli. Efektive, ŝi ŝanceliĝis, ne sciante, ĉu estas konvene preĝi al Dio en ĉeesto de hebreino, kaj ĉu hebreino permesos, ke oni en ŝia ĉambro preĝu laŭ kristana maniero.

„Ne estas necese“, ŝi respondis. „Sed mi ne scias, eble por vi tio estas malagrabla?“

„Preĝu, mi petas!“ simple diris Roza kaj komencis ordigi la lito.

Anna legis siajn preĝojn, kaj ambaŭ knabinoj senvestiĝis. Poste Anna fermis la gasbraketon, kaj la lumo estingiĝis. Post kelke da tempo en la mallumo videblis fenestro kaj tra la fenestro alte super la ĉiam brueganta urbeĝo — malgranda pala luno.

„Pri kio vi pensas?“ demandis Roza Anna'n kuŝantan apud ŝi.

„Mi pensas . . . ĉu oni vidas nun ĉi tiun lumon en nia urbeĝo?“

Esperanto en Kimra Lernejo.

Grava Propagando de Kimraj Infanoj en Belĝujo.

En Kimrujo oni parolas kimre kaj angle. Ĝenerale en la lernejoj oni instruas ambaŭ lingvojn, sed en iuj regionoj la kimra lingvo estas fakultativa. Barry en Glamorgan estas unu el tiuj lokoj, kaj en ĝia lernejo krom la angla lingvo oni devas lerni aŭ la kimran aŭ la Esp. lingvon. La ĉefinstruisto s-ro R. T. Evans diras, ke la enkonduko de Esperanto en la lernejon estas granda sukceso. La infanoj korespondas esperante kun lernejoj en Ĉeĥoslovakio (du lernejoj), Holando, Francujo, Belĝujo kaj Hispanujo, kaj kun korespondantoj en Finnlando, Italujo kaj Germanujo.

La lernejo posedas faman knabhoristaron, kiu havas famon ekster la bordoj de Kimrujo. En 1914 ĝi vizitis Usonon kaj Kanadon, en 1912 Parizon. Ĝi ankaŭ gajnis unuan premion ĉe la Kimra Nacia „Eisteddfod“ (konkursfesto). Oni faris aranĝojn por vizito de la horistaro al Belĝujo dum la pentekosta libertempo, kiam la knaboj kantas angle, kimre kaj esperante en Ostiend, Gento, Brugge, Bruselo, Antverpeno kaj Liège. En Liège ili ĉeestis la Belgan Esperantistajn Kongreson. La aranĝoj en Belĝujo estas sub la administrado de s-ro Frans Schoofs. Kurso de geknaboj en Antverpeno nun lernas la lingvon por interparoladi kun la vizitantoj.

La lernejo en Barry estas la unua en Kimrujo, kiu enmetis Esperanton en sian programon. Ĝi estas la unua en Britujo, kiu entreprenis tian unikajn praktikan internacian manifestacion de la valoro de Esperanto.

W. M. P.

Esperanto en Jugoslavio.

La 3. de marto okazis la ĉefkunveno de la „Societo de Esperantistoj en Zagreb“. Vicprezidanto d-ro Maruzzi, sekretario Bertoli, kasisto Pipiniĉ kaj bibliotekisto Ŝintiĉ legis siajn raportojn, laŭ kiuj la socio travivis sian 13. jaron, kiu estis ĝia plej sukcesplena.

En la ĵus pasinta jaro okazis 10 publikaj paroladoj kaj 11 kursoj. La 15. decembro estis aranĝita Zamenhof-vespero la 5. februaro amuzvespero. Laŭ la instigo de la socio estis malfermitaj kursoj en Split, Mostar, Kostajnica, Vinokovci, Krievci, Vel. Beĉkere, Dugoselo.

La publika opinio nun estas tre favora al nia movado, dank' al bonaj instruz rezultatoj kaj al subteno de la gazeto, kiu volonte malfermas siajn kolonojn por sciigoj el Esp. vivo. La registaro donacis 2000 kronojn kiel unuan subvenciojn.

La komerclernejo „Merkur“ enkondukis Esperanton. La asocio de gastejestroj sin turnis al la socio por pritrakti la demandon de enkonduko de Esperanto en kelneran lernejon.

La socio kalkulas 136 membrojn. La enspezoj sumiĝis al 36 552,55 kr., la elspezoj al 22 289,28; kontanta haveco 14 453,07, kun inventaro 26 195,87 kr. kun biblioteko 28 183,87 kr.

Nuntempe estas gvidata kurso por komencantoj (137 lernantoj), gvidas d-ro Maruzzi, kurso por progresintoj (49 lernantoj), gvidas P. Kastner.

Post aprobo de la raportoj estis elektata nova komitato. Prezidanto prof. Novljan. Komitatoj: A. Bertoli, f-ino Ivka Denich, J. Janoušek, P. Kastner, universitata prof., d-ro A. Langhofer, d-ro D. Maruzzi, f-ino St. Feras, N. Perčec, J. Pipiniĉ, d-ro St. Rosenstok, St. Ŝintiĉ, D. Ŝtefankoviĉ, d-ro Zvjezdiĉ kaj f-ino Zupić.

„Ne, oni ne vidas“, respondis Roza: „ĉe vi estas nun tago . . . Kia estas la nomo de via urbo?“

„Dubno.“

„Dubno?“ aŭvece ripetis Roza. „Ni ankaŭ estas el Dubno . . . Kial vi elmigris el tie?“

„Miaj fratoj forveturis la unuaj . . . Mi loĝis kun nia patro kaj kun la plej juna frato. Poste tiun fraton oni kondamnis al ekzilo . . .“

„Pro kio?“

„Li . . . kredu al mi . . . Li ne estas ŝtelisto aŭ . . . sed . . .“

Ŝi ŝanceliĝis. Ŝi ne deziris rakonti, ke kiam oni ruinigadis hebreajn domojn, li ankaŭ partoprenis en la pogromo, kaj poste li kun siaj kunuloj kontraŭbatalis la soldatojn. Ŝajnas al ŝi, ke estas pli bone ne rakonti tion, tial ŝi silentis.

„Jes“, diris Roza, „ĉiu homon povas trafi malŝelito. Ni vivis tute trankvile kaj tute ne havis intencan vojaĝi tiel malproksimen. Sed poste . . . certe vi scias . . . kiam okazis pogromo en nia urbeĝo . . . Kion la homoj bezonis? Oni ĉion disbatis en nia urbo, kaj mia patrino . . .“

Sia voĉo ekstrems.

„Ŝi estis malforta, malsaneta . . . ŝi ekfimegis . . . pro ekscito ŝi mortis . . .“

Anna tuj pensis, kiel bone ŝi faris, ne rakontinte al Roza ĉion pri sia frato. Ŝia koro iel strange kuntiriĝis . . . Longe ankoraŭ ŝi kuŝis silenta, kaj strangaj ŝajnis al ŝi tiu obtuze bruanta urbeĝo, kaj la homoj, kaj tiu lito, en kiu ŝi kuŝas kune kun hebreino, kaj ŝia preĝado en hebreina ĉambro, kaj ĉi tiu hebreino mem, tute malsama ol kia ŝi estus tie, en la patrolando.

(Daŭrigota.)

M. Gorkij pri Esperanto.

La konservativa pensado obstine provas, ke Esperanto estas utopio. La vivanta, laŭleĝe disvolviĝanta realeco ne rapidante, sed ĉiam pli decide refutas la argumentojn de l' konservativuloj.

Antaŭ 40 jaroj la plimulto de homoj opiniis la elektran energion hereza elpensajo kaj sensenca utopio; antaŭ 20 jaroj la aerveturo estis rigardata kiel utopio; telefono estas ankaŭ unu el „Utopioj“ efektiviĝintaj per la homa menso; la senfadena telegrafado ankaŭ estis frenezajo.

Sed, ĉiam restante venkinto en lukto kun misteraj fortoj de l' naturo, nia senlaca spirito fariĝas ĉiam pli ridinda kaj solvigas elpensajojn kaj demandojn ĉiam pli „utopiajn“, ĉiam pli „sensencajn“.

La mezepokaj utopioj pri la „filozofa ŝtono“ kaj „vivlikurso“ estas nun prilaborataj de la plej famekonataj scienculoj.

La plej eminentaj homoj en Rusujo celas efektiviĝi la plej frenezajn „utopiojn“ — startigi en la mondo la socialan justecon, — kaj oni ne povas diri, ke iliaj penoj estas sensukcesaj.

La historio de l' kulturo elokvente diras al ni, ke la plej sentimaj gvidantoj de l' homaro sukcesis efektiviĝi multe da „frenezaj utopioj“ kaj ĉiam pli ofte tiuj frenezajoj de l' sonĝo fariĝas laboraj hipotezoj de l' scienco.

Nun, al efektiviĝo de l' utopio aliĝas multaj miloj kaj milionoj da homoj . . . kaj nun unika, internacia lingvo estas necesa al la homaro pli ol iam ajn antaŭe.

Se ni bone deziras, ni ne malbone agas. La neceso de l' unika lingvo por la internacia proletario estas bazita sur la unueco de l' klasaj deziroj kaj celoj proletariaj.

Esperanto, — laŭ mia vidpunkto, — estas sana kaj vivkapabla por la plua disvolvado de l' embrioj de la lingvo internacia. Jam nun Esperanto posedas sufiĉe grandan literaturon kaj estas sukcesplene studata teorie. Tiu ĉi laboro estas pli sukcesa kaj rapida, se oni aliros al ĝi scienculojn-filologojn el la mezo de tiuj, kiuj estas konvinkitaj je neceso de l' homara unuigo.

Oni diras: „la lingvo ne disvolviĝas artifice“. Mi ne estas esperantisto, sed mi scias ke tiu ĉi artefarita lingvo, disvolviĝante sufiĉe rapide, fariĝas tute natura, ĉar ĝi respondas al la neceso de la nuna homaro trovi, krei komunekomprenblan lingvon.

En la 1910-a jaro mia konato Jakutskij, Aleksej Semenoviĉ, vojaĝis tra la tuta Eŭropo ne sciante eĉ unu el eŭropaj lingvoj, parolante nur en Esperanto, — li tion faris por persone konvinkiĝi je la disvastiĝo de l' „artefarita“ lingvo.

Preskaŭ en ĉiu urbo li trovis esperantistajn organizacion, hotelojn, gazetojn, literaturajn, — ĉefe estas riĉa je tiuj organizacioj Italio kaj la havenurboj mediteraneaj.

Mi estas profunde konvinkita, ke la organizita volo de popoloj estas tute kapabla naturigi la „artefaritan“.

Ĉu la tuta nia kulturo ne estas io „artefarita“? Tamen, ni ĝisvivis la tempon, kiam homo nekultura ŝajnas malamika al niaj celoj, malhelpema en la progreso de l' plua kresko de kulturo.

Pro venko de kulturo ni kreas la revolucion, ni elspezas ĉiujn fortojn de nia spirito, de nia volo, ni oferas nian personan volon, nian vivon.

Ĉu oni povas nei, ke lingvo, unika por ĉiuj, donos fortegan antaŭenpuŝon al la proceso de kultura disvolvado?

Oni ne povas. Do — oni devas konfesi ke estas necesa la kreo kaj disvastiĝo de tia lingvo.

M. Gorkij.

Tradukis el rusa lingvo P. Medem.

NB. Kvankam mi persone ne konsentas kun la argumentado kaj kelkaj pensoj de l' aŭtoro, tamen la verko povas havi grandan intereson por la esperantistaro. Tial mi ĝin tradukis kaj sendas al redakcioj. La artikolon mi ĝis ricevis el Petrograd. (P. Medem.)

Porkongresa Propagando.

Germana Esp. Asocio aranĝis la 22., 23. kaj 24. marto en Dresden, Riesa kaj Oederan lumbildajn paroladojn de s-ro Pitlik pri la kongresurbo „Praha, la naturaj belaj de ĉeĥoslovaka respubliko: mondbanejoj, montaro Tatra, stalagmita kaj stalagmita grojaro Moravia Karelo kaj naciaj kostumoj“. Ĉeestis en Dresden (Konzerthaus) 600 pers., Riesa (Elbeterrasse) 150 p. kaj Oederan (burga lernejo) 80 p. Prezidis s-ro Ranft, d-ro Döhler kaj instr. Weilmann. En Riesa kaj Oederan estis por multaj neesperantistoj tradukitaj la ĉefaj partoj de la parolado germanlingven.

Kroniko.

BUDAPEST. Fine realiĝis la plano fondi novan kunvenaron de bonaj esperantistoj en Budapeŝt. Precipe s-ano d-ro Mezel klopodis kunvoki la malnovajn antaŭmilitajn samideanojn, kiuj nun ĉiutage vespere post la 9-a kunvenas en etaĝo de kafejo Kovacs, sur la Oktogon-Placo en la mezo de la urbo. Gastoj nepe viziti la kunvenojn! Kursoj kaj ordinara kunveno restas lunde kaj vendrede vespere de 6—8 h. en la Socia Muzeo (VI. Eötvös u. 3, duoneŝtaĝo).

WÜRZBURG (Germ.). S-ro Rippel, ĝis nun izolulo, hejmgigas Esperanton en tiu ĉi urbo. Li instruas en du kursoj 60 gepersonojn. La komercistaro dungis lin por instrui en la venonta instruotempo. Estas multa intereso ĉi tie por Esperanto.

Lernejo.

Oficiala sukceso de Esperanto en Hamburgo.

Depost Pasko Esperanto estos devige instruita de profesiaj instruistoj en tri triaj klasoj de la popollernejo ĉe Kaethnerkamp en Hamburgo. — La Supera Instruata Estraro donis sian konsenton post kiam la instruistaro plejgrandparte subtenis la unuaniman deziron de la kunvenintaj gepatroj enkonduki la instruadon de Esperanto.

Gazetaro.

ABENDZEITUNG, 15. marto. Saaz (Bohemio). Tagjurnalo, enhavas grandan artikolon pri la fondiĝofesto de la Saaz'a Esp. Unuigo.

KARJALA, ĉiutaga ĵurnalo de Viipuri, Finnlando, de 15. marto enhavis artikolon pri la decido de la Pariza Komercia Cambro, tradukitan el ET de O. Eriksson.

PÄEWAHLET, 15. marto. Granda tagjurnalo aperanta en Tallinn, Estonio. Enhavas sciigojn pri Esperanto ĉerpiatan el ET. La prestiĝoj uzataj de tiu ĉi ĵurnalo estas la t. n. „germanaj“. La samaj sciigoj aperis ankaŭ en la ĵurnaloj WABA MAA kaj KAJA.

Okazontaj Kongresoj.

20.—24. aprilo. VI-a Brazila Kongreso de Esperanto en Rio de Janeiro. Honora prez.: d-ro Carlos Sampaio, ĉefurbestro de Rio de Janeiro. Adreso: s-ro Odillo Pinto, Praça 15 nov. 101-2, Rio de Janeiro.

PENTEKOSTO (14.—17. aprilo). XII-a Brita Esp. Kongreso en Harrogate, kaj X-a Germ. Esp. Kongreso en Essen.

26.—29. majo. II-a Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj (Dudkeilo) en Zaragoza.

Internacia Katolika.

„Moka“.

En POLIO funkcias tri delegitoj de „Moka“: Siedlce (s-ro Pruski), Przemysl (s-ro Pakula), Bydgoszcz (s-ro Prengel). Kiel unua junulara grupo en Polio aliĝis al „Moka“ la Bydgoszcz'a Esp. grupo „Antaŭen kun Kredoj“, fondinto eklez. kons. kaj prepozito Becker, prezidanto s-ro Kowalewski.

Lautlegado pri Argentino en Budapeŝt.

La 11-an de Marto vizitis la grupon en la Socia Muzeo s-ano hungara el Argentino: Ludoviko Kelety, kiu laŭleĝis tre interesan prelegadon pri Argentino, pri ties ekonomio kaj nuna vivo, pri la vojaĝo hejmen kaj pri la granda utilo de Esperanto dum la vojaĝado tra multaj landoj. Post unuhora laŭlegado li devis prokrasti la daŭrigojn al la 14-a de marto, kiam li antaŭ kvindek personoj finis la prelegadon. Li intencis fari tiun ĉi paroladon laŭ invito en alirubaj kaj ankaŭ alilandaj esp. grupoj, ankaŭ publike kun lumbildoj. Ĝi estis interesa pro ne tre konataj Argentinoj kaj samtempe bona propagandilo por nia lingvo. Li komencos sian rondvojaĝon tra la eŭropaj landoj (se eble ĝis Finnlando) dum somero. Grupoj, kiuj volas inviti lin, skribu al lia nuna adreso provizora: s-ro L. Kelety, Szászsebes, Transsilvanio (nun Rumanujo).

Notoj.

Lautempaj pensoj.

● Pri indianaj gentoj de Brazilujo estas sciigate, ke en iliaj lingvoj la ideoj „ni“ kaj „bona“ — „ne ni, do fremdula“ kaj „malbona“ estas samaj, tute identaj. Ĉi tiuj indianoj do kredigas, ke ĉio apartenanta al sia gento aŭ okazanta tie estas bona; male de la fremdulaj gentoj venas ĉia malbono kaj malfeliĉo. Sed ĉi tiuj primitivaj diferencadoj diras al ni ankoraŭ ion alian. Ekzemple dum la monda milito ni observis denove, kiel la „ni“ estis identigita kun la „bona“, la „vi“ kun la „malbona principo“ ĉe preskaŭ ĉiuj eŭropaj popoloj kaj ankaŭ ĉe aliaj, tiel ke kelkriate ni eŭropanoj diferencas ne tro de diversaj tieldirate primitivaj popoloj, kvankam kelkaj el ni eble supozas alie. Beston ni komprenas des pli vere, kiam ĝi supozas kaj malamas alispecan beston kiel malamikon. Sed en la granda regno animala relative estas malofita okazo, kiam besto kontraŭbatalas kaj mortigas samspecan kunvivantulon; tian kontraŭnaturecon atingis sole la homo! Rilate la jam diriton pri la kultura homo dum la mondmilita tempo (eble ankoraŭ nun?) ankaŭ en nenaturscienculo ekvekiĝas komparentaj pensoj, kiuj certe ne diras favoran komplimenton al la kulturhumoro, ĉu pri ties nobleca deveno ĉu pri ties nuna moraleco. Ni esperu, ke la interna ideo de l' esperantismo ankaŭ helpu, akiri ĉe laŭleĝe la plej multaj homoj tian feliĉigan fratecon, kiun multaj esperantistoj en la tutmondo jam sentas ĝoje, sen malutili al sia propra nacieco.

Otto Marquard.

30 000 novaj Esp. lernolibroj en Ruslando.

Samideano Ernest Drezzen el Moskvo skribas la 1-an de februaro jene: „ . . . Antaŭ kelkaj tagoj Popola Komisararo por la Klerigo eldonis 30 000 ekz. da „Cart & Pagnier“, rusan lernolibron.“ Ĉu ne estas interese, ke la registaro en Rusio mem eldonas Esp. lernolibrojn? Kaj tio estas spite la kontraŭlaborojn de kelkaj agemaj idistoj eksterlandaj.

Tra la Mondo.

Eksreĝo Karolo neatendite vizitis Budapeŝton je Paska dimanĉo. Oni supozas, ke li nun estas en Steinamanger (Hung.). Pri liaj intencoj oni ne estas informita.

En Meza Germanio ekflamiĝis ribelo de la komunistoj, kiuj parte etendiĝis al aliaj regionoj; oĥi supozas baldaŭan retrankvilon.

La aŭstrala ĉefministrio konfirmis en Londono, ke Aŭstralio vendis grandajn kvantojn da greno al Germanio.

Laŭ raportoj el Tokio la urbo estas difektita de granda brulego, kiuj detruis pli ol mil loĝejoj kaj senhejmigis ĉ. 5000 personojn.

Sporto.

PIEDPILKO. La landa ludo Svedio-Aŭstrio en Wien (Paska Lundo) finiĝis per 2:2. — En la Amsterdam'a stadiono ludis la nacia bando de Svisio kontraŭ tiu de Nederlando. La nederlandanoj venkis per 2:0 goloj.

Al Poŝtistoj.

Post raporto de la subskribito, la poŝtestro por la Teritorio de Libera Urbo Danzig, sinjoro poŝta konsilisto Zander, invitis la tutan gepoŝtistaron per oficiala dekreto je klariga parolado okazinta la 14-an de januaro 1921 en la ĉefa poŝto-oficejo. Partoprenis ĉirkaŭe 150 personoj. Mi paroladis pri la esenco de Esperanto kaj ĝia uz-ebleco. Nova kurso por gepoŝtistoj komencis kun 60 partoprenantoj. Ĉar mi oficas en Supera Poŝta Direkcio por Teritorio de Libera Urbo Danzig kaj prilaboras ĉiujn kontraktojn kaj korespondadojn kun eksterlandoj, mi urĝe deziras uzi kion eble plej multe Esperanton kaj petas insiste ĉiujn oficistojn poŝtajn, telegrafajn kaj telefonajn, ke ili iru aŭ skribu al tiuj oficistoj en aliaj ŝtatoj, kiuj ankaŭ oficas en oficejo por eksterlandaj aferoj kaj instigu ilin pro korespondado oficiala en Esperanto. — Oficistoj kiuj prilaboras eksterlandajn korespondadojn unuavice nepe devas lerni tuj Esperanton. La uzado en ofico estas la plej grava propagandilo.

Oficistoj de eksterlandaj poŝto-oficejoj aŭ de porskterlanda fako de poŝtaj direktoj bonvolu tuj informi sinjoron poŝtan konsiliston Otto Reber en Bamberg (Germanujo), kiu estas prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝtoficistoj.

Danzig
(Libera urbo).

B. Ketterling,
supera poŝtsekretario
prez. de Danziga Esp. Asocio, del. UEA.

Samideanoj-Psikistoj!

Mi petas ĉiun samideanon, kiu partoprenos la XIII-an en Praha, ke li tuj anoncu sian adreson al mi, por ke mi povu prizorgi ĉion necesan por la Psika sekcio, laŭ la nombro de la partoprenantoj.

Jen ĝeneralaj temoj de nia kunsido:

1. Unversala faka kunlaboro.
2. Centra faka redakcio.
3. Faka vortaro esperanta.

Krom tiuj ĝeneralaj temoj anoncis jam kelkaj samideanoj siajn paroladojn.

O. Sklenčka, del. UEA,
Hradec Kralove,
Ĉeĥoslovakio

(Esperantistaj gazetoj estas petataj represi.)

Abono al ET.

Ni liveras al ne-germanaj landoj: 50 n-rojn por 80 germ. mk., 10 ŝil., 10 sv. fk., 20 fr. fk., 5 hol. guld., 2 dolaroj aŭ 30 liroj (liroj ni akceptas nur el Italio); 25 n-rojn por duona prezo. — Al Germanio, Baltiko kaj Balkano 10 n-rojn por 10 gmk. — Al Aŭstrio kaj Hungario 10 n-rojn por 30 kr., al Polio 25 n-rojn por 150 mk., al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 kr.

Oni pagu per monbiletoj, bankĉekoj aŭ poŝt-avizoj.

Germanoj pagu ĝis fino de junio al poŝtĉek-konto Köln 70863, Teo Jung, Horrem; post 1. julio ili abonu per la poŝto.

☆ ☆ ITALIA ☆ ☆ ESPERANTISTO

Oficiala Organo

de la Federacio Esperantista Itala. * * *
Jarabono: 15 Liroj. Helpabono: 20 Liroj.
Administrejo: Via Rossari 2, Milano (Italio).

Angla kaj Esperanta Etimologio

(Angle kaj Esperante).

Verkita de Charles G. Stuart-Menteth.

„Utila lernilo per atentigi la publikon pri multaj Esp. radikoj en ilia lingvo.“ *Holandia Pioniro*.

„Intereseĝaj tabeloj.“ *Kristana Espero*.

Prezo 10 pencoj (= 4 respond-kuponoj) afrankite.

17, Hart Street, London W G 1.

Recenzejo.

LIBROJ.

ANTAŬ-KATALOGO. Provizora listo de la ekspozitoj en la 4-a Internacia Foiro de Frankfurt a. M., 10.—16. aprilo 1921. Eldonita de la foiro-oficejo.

La antaŭkatalogo enhavas laŭ branĉoj ordigitan liston de la ekspozitoj; ĝi estas dissendita en 100000 ekzempleroj al elektitaj adresoj de aĉetantoj al la ens- kaj eksterlando. La simpla kaiero — jam nun donante bildojn pri la amplekso kaj la karaktero de la foiro — estas konvinka argumento por tio, ke la vizito al la frankfurta printempa foiro estas necesa por ĉiu komercisto.

HARROGATE. La „Mecca“ de la malsanulo kaj la ludo de la fortikulo. Sezono 1921. Eldonita de la Harrogate Corporation, Publicity Department. 10 1/2 : 24 cm. 8 pg. kaj kovrilo.

Jen efika reklamilo en ne kutima sed plaĉa aranĝo. La teksto (ĝenerala priskribo) presita en bruna kaj la ilustraĵoj (siluetoj el la baneja vivo) en verda koloro. En Harrogate okazos la nunjara Kongreso de Britaj Esperantistoj.

(H)OMARO. Sendependa broŝuraro. Aperas laŭ Eblo. Neabonebla.

Jen tre stranga titolo, kiu igis min supozi, ke ĝi estas ia karnavala aŭ spritaja gazeto. Sed mi eraris: la titolon oni legu Homaro kaj ne Omaro, kaj la enhavo estas dediĉita al la homaranismo. Do kial la stranga titolo? — Interesuloj povas aĉeti la broŝuron po 2 ekz. por 1 resp.-kup. ĉe s-ro J. Mangada Rosenörn, Jaca (Hispanio, Huesca).

KIEL-ONI FONDAS KAJ ORGANIZAS ESP. GRUPOJ. (R-ano.) Kun aldono de statutoj por esp. grupoj. De Hans Sappl, Paulus-Eldonejo Graz (Stirio). 12:16 cm. 28 pg. kaj kovrilo. Prezo 5 gmk.

La broŝuro enhavas bonajn konsilojn en laŭcela aranĝo, kaj ĝi certe povas multe utili al nespartaj fondontoj kaj organizantoj de grupo. Bedaŭrinde la stilo ne estas ĉiam modela, kio — krom sufiĉe multaj preseraroj — kelkfoje malklarigas la sencojn. Ni esperas, ke en dua eldono oni povas eviti tion.

MUSCAT & CHRISTLEIN, Nürnberg (Germ.) De tiu firmo ni ricevis 4-paĝan, riĉe ilustritan prospekton pri siaj bruligiloj kaj raz-aparatoj. Krom en Esperanto, la teksto estas redaktita en la lingvoj germana, angla, franca kaj hispana.

OFICIALAJ GLUMARKOJ pri la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto, Praha 1921.

3 diversaj specoj (nutvindaĵo de Praha kun Hradčany, kastelo, kaj Hradčany kun bildo de d-ro Zamenho), ili estas presitaj parte en blugriza, parte en oranĝa koloro kun verda stilo je la firmamento. Kompare al ilia formato (3 1/2 : 6 cm) ilia beleco ne estas tre granda. Plej bona estas eble la kastelbildo; sed la aliaj, precipe tiu kun la bildo de la majstro, nepras plaĉas. Mi esperas, ke la kongreskomitato eldonos ankoraŭ novan serion pli indan, pli bele desegnitajn kaj en pli efikaj koloroj presitan. (R-ano.)

GAZETOJ.

ESPERANTA FINNLANDO. Marto. Enhavas detalan raporton pri la parlamenta kunsido, en kiu oni decidis subvencio de 25000 fmk. al Esp. Asocio de Finnlando. Kun ilustraĵo: Finnlanda Parlamento en Plenkunsido.

ESPERANTISTA MOVADO. Jan.-febr. Jen gazeto de 24 paĝoj, presita sur bona papero, de Kronstadt'a Esp. Societo, Kronstadt (Ruslando). Prosp. de Lenin 50. Kun vasta rusingva kroniko el Ruslando, Kaukazio, Dondistrikto, Turkestano, Siberio ktp. Ceteraj tekstoj ĝi rusa lingvo aŭ Esperanto. — Notinda estas, ke la duobla numero kostas 100 rublojn.

GERMANA ESPERANTISTO. Marto. Bona propagand-artikolo pri „Esperanto kaj la poŝto“ de poŝtdirektoro Rieck, kaj la alia interesa enhavo.

HUNGARA ESPERANTISTO. Marto. 12-paĝa, ĉia send honnehava eble iom tro naciera. Ekskluzive en Esperanto, ĉi tiel rekomendinda kiel malkara lego al eksterlandanoj. Jarabono 1 sv. fk., 6 gmk. Adreso: Szeged, Szentharomsag uica 30.

INTERNACIA KOMERCA REVUO. Dec. 1920. Kiel ĉiam, ankaŭ tiu ĉi numero estas tre interesa. Tamen, se la abonantoj ricevas la revuon same tiel malfrue kiel ni (5 monatojn post la eldonado), la artikoloj multe perdas de sia valoro, ĉar ili fondiĝas. Aranĝo kaj preso de la revuo estas bonegaj. Ke ĝi ne trovas pli da subteno de la esp. komercistoj, estas bedaŭrindege.

ITALA ESPERANTISTO. Marto. Artikolo pri Ravenna kun ilustraĵo: Tombo de Dante. La oficiala scigo n-ro 5 de Federacio Esperantista Itala vidigas fervoran laboron, kiu certe ne restos senfrukta.

LABORO. Jan. kaj febr. Post longa interrompo ni ricevas atingas tiu ĉi gazeto. Adreso: R. Antonio Maria Cardoso 20, Lisbono, Port.

LA ESPERO. Febr.-marto. Enhavas la programon de la Sveda Esp. Kongreso, 25.—27. marto en Falun.

LA MARTO. Marto. Interesaj artikoloj. Ni ne konsentas la anstataŭigon de „delikata“ per „fina“, ĉar radiklo fin' jam havas alian signifon.

LA PROGRESO. Marto. Priskribo de Praha. T. G. Masaryk 71-jara, Literaturo, Felietono. Esperantismo. Diversajfoje (kun bedaŭrinda polemiko kontraŭ la redaktoro de „Esperanto Praktiko“), Kroniko. Bibliografio.

NEDERLAND-ESPERANTO. de 5., 10., 17. kaj 24. febr. Malgranda, sed bone redaktata gazeto aperante regule kaj ĉiusemajne.

VERDA UTOPIO. Jan. Ni ĉiam ĝojas, ricevante tiun carme ilustritan revuon, saluton el la malproksima oriento. Tute redaktata en Esperanto, ĝi rakontas al ni — kvankam la stilo ne estas ĉiam konforma al nia eŭropa — impresoj pri vivo kaj moroj en Japanio.

Pola eldonisto havas la eblon tuj liveri 1000 ekzemplerojn de la fame konata verko

Parnaso de Popoloj

majstre tradukita de Antoni Grabowski.

La libro enhavas krom originalaj poemoj ankaŭ tradukojn el 30 diversaj lingvoj.

Gardforma libro 230-paĝa.

Prezo malkara.

La ofertojn oni bonvolu direkti laŭ adreso: **Adolfo Oberrotman, del. UEA en Varsovio, Krak-Przedm. 10 (Polio).**

Tubo-Kondukilaroj

por elektraĵ centroj kaj fabrikejoj.

Fratoj Stork kaj Kio, Hengelo (O) Nederl.

Nur petoj de gravaj firmoj estos respondotaj.

3a Internacia Specimena Foiro en Padova (Italio)

1.—15. Junio 1921.



Unua foiro en Italio en neprovizoraj konstruaĵoj (24000 m²) kaj tute kovritaj trairejoj, en propra kvartalo de 160000 m².



Ĉiulandaj komercistoj egalkondiĉe akceptataj. Ĉiuj industrioj allasataj.

Senpagaj Esperantaj presajoj kaj ĉiuj informoj pri partoprenado, vizitado kaj organizado haveblaj ĉe Ufficio Informazioni della

3-a Fiera Internazionale di Campioni in Padova (Italia).

★ Svisa Esperanta Servo ★

„SVESO“

Montreux, 63, Grand Rue. Centra Svisa Librejo.

Havigo de ĉiuj esperantaj al svisa esperantistaro.

Abono al eksterlandaj ĵurnaloj.

Kunmetado de biblioteko.

Programoj de Esp. kursoj.

LITERATURO

Por iom pliampleksigi la esperantigitan klasikan literaturon elgermanan, malnova esperantisto intencas aperigi dum aprilo tradukon laŭ la tragedio „Egmont“ de Goethe. La prezo estas verŝajne 10 ĝis 15 markoj germ. Por povi priuĝi, kiom da ekzempleroj estu presataj en la unua eldono, la eldonanto deziras plejble baldaŭ ricevi antaŭmendojn, kiujn ĉiuj esperantistoj, librovendistoj ktp. bonvolu transskribi al

Paul Gottgetreu, Hannover
Herrenstr. 12. ★ (Germ.) ★ Herrenstr. 12.

Malgranda Esperantistino

alvenis ĉe ni Paskan dimanĉon kaj ricevis la nomon Lydia. Gesinjoroj Heinz Jung kaj Sully Jung, nask. Fabel, Kolonio—Horrem, edlonejo de „Esperanto Triumfonta“.

Anoncetoj.

RESPOND-KUPONO. La redakcio de ET posedas kelkajn centojn da negermanaj respond-kuponoj. La germana poŝto pagas por ili nur po 80 pig., dum en landoj kun bona valuto oni ricevas minimume 20 cts. (ĝis antaŭ ne-longe 25 cts.), do pli ol la duoblon. Ni petas samideanojn en bonvalutaj landoj, kiuj povas kaj bonvolas ŝanĝi la kuponon ĉe sia poŝto, skribi al ni. Ni antaŭdankas.

SPERTA VARTISTINO por majluna sinjoro tuj serĉata. — Sinjorino Muhlpiordt, cigarfabrikejo, Merseburg (Germ.), Neumarkt 30.

SCIGO. Mi ricevas multajn leterojn, en kiuj mi estas petata sendi svisan papermonon en rekomendita letero. Do mi scigas, ke ne estas permesite sendi el Svisujo ian monon enlandan, oni devas ĝin ŝanĝi en la monon de tiu lando, en kiun oni sendas monon. Ankaŭ mi petas miajn gekorespondantojn, legeble skribi monon kaj adreson; al mi tute ne estas eble legi kelkajn, tial ankaŭ neeble respondi. — Alexandra Mexin, del. UEA en Montreux.

POŝTKARTOJ montrantaj la plej famajn polajn poetojn, muzikistojn, pentristojn, kiel Mickiewicz, Slowacki, Chopin, Moniuszko, Paderewski, Matejko kaj multajn aliajn, des pli valoraj ĉar ili parte montras nacian vestaĵon, riceveblaj ĉe **POLA ESP. SERVO.** Bydgoszcz (Polio), Podgorze 17. Prezo por unu serio (12) 2 resp.-kup. aŭ du Esp. insignoj. Same ricevebla la popol-kanto „Kiu sin donos“ de la fama verkisto pola Jan Kochanowski, majstre tradukita de Bruno Kuhl, kun melodi-aldono. Prezo por serio kiel supre. Ilustr. gvidilo tra Bydgoszcz 1 resp.-kup.

SPORTO. Eŭgeno Mayer, Budapeŝto VII, Dob-u. 36, ŝ. 5, deziras korespondi precipe kun sportistoj kaj interŝanĝas atletikajn poŝtkartojn ilustr. Certe respondos.

SAKSOFONOJ. — C. Carter, 115 Morley Av., N. 22, London, deziras aĉeti. Sendu katalogon kaj prezojn

ĈEĤOSLOVAKOJ ATENTU! Studento E. Feihke, Oppeln, Ring 11, Supra Silezio, konante la polan lingvon, deziregas elerni per korespondado kun ĉeĥoslovakaj aŭ —ino la ĉeĥan lingvon kaj laŭ deziro rekomence instruos la polan lingvon. Li intencas partopreni la XIII-an.

SENDI TUJ vian adreson aŭ anoncon por 3-a eldono de „BES-a Adresaro de Esperantistoj!“ Postulu senpagan prospekton! — Bohema Esperanto-Servo, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

RETROVINTO. La delegito de UEA en Varsovio sciigas, ke en Strzalkovo (Polio) troviĝas rusa militkapitulo nia fervora s-ano N. Nickrasov. Lia adreso estas: Obor jencow n-ro 1, Strzalkonice (Polio), Kancelaria oddr. 1, N. Nickrasov.

ESP. GAZETONJ interŝanĝas, poŝtmarkan kolekton je favoraj prezoj proponas kaj siajn verkojn „La Bulgara Lando kaj Popolo“ kaj „El la proksima Oriento“ (ambaŭ kun trikoloraĵ etnogr. kartoj) po 50 gmk. vendas: Ivan Krestanoff, Karlovo (Bulg.).

DESEGNO-PAPERO. Johano Toman, Budapeŝto IX, Gat-u. 25, 1-8, petas universitatajn studentojn sendi al li tutfoliojn desegno-paperojn; ĉar en Hungario tiuj nur karege estas riceveblaj. Ĉiun sendon li tuj rekompenkos per esperant-ajfoj.

DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERŜANĜI:

J. Nagamacu, Fukuoka (Japanujo) Imperia Universitato, medicina fakultato, deziras korespondi kun tiujmondaĵ samideanoj por poŝtkartoj ilustritaj kaj leteroj.
S-ro F. Peedo-Winkel, Fontanka 27, Estokomitee, Petrograd (Rusio), interŝanĝas sovietajn kaj estonian poŝtkartojn.
S-ro Emiel van Grieken, 125, avenue Prudent Bols, Laeken (Bruxelles, Belgio), deziras interŝanĝi poŝtkartojn.
S-ro Karlo Markovits, Budapeŝto VII, Elemer 17, f. 8, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustritaj.
S-ro Stefano Bakonyi, Budapeŝto IV, Szep. u. 5, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustritaj.
Kiu sendos al mi 25—50 poŝtkartojn de sia lando, ricevos same tiom da nuntempaj germanaj poŝtkartoj. Karl Kueper, Düsseldorf 5 (Germ.), Graf Adolfsstr. 11.
S-ro Paul Münten, Düsseldorf (Germ.), Fürstenwall 119, deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj; ĉiam respondos.

Anton Theile, Düsseldorf (Germ.), Johannstr. 28, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj, plej volonte per poŝtkartoj. Edwin Haschke, Breslau (Germ.), Kronprinzstr. 11, 18-jara, deziras korespondi kun gesamideanoj de tuta mondo per poŝtkartoj ilustritaj; mi respondos tuj.
Joachim Kraft, Berlin-Neukölln (Germ.), Weigand-Lifer 38, deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj korespondi per ilustr. poŝtkartoj.

Kiu sendos al mi 20—25 nesamajn poŝtkartojn de sia lando, ricevos same tiom da nuntempaj litovaj kaj malnovaj rusaj (de la cara tempo). Hans Naehring, Poŝt. Zeimelis, Melguzra dvaras, Litovio.

12—14-jaraj geinfanoj deziras korespondi kun geinfanoj el ĉiuj landoj. Skribu al Hans Heinrich, Plauen (Germ.), Moritzstr. 76.

Ladislau Szilasi, Budapeŝto V, Podmenicki-u. 75, deziras korespondi kun junuloj instruitaj, muzikemaj.

F-ino Margareto Toman, Budapeŝto IX, Gat-u. 25-1-8, deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanojn.

Mi vendas hungarajn poŝtkartojn, multe pli malkara el katalogo-prezoj. — Kolomano Wiesinger, Budapeŝto VII, Wesselényi str. 50.

Antal Szöllösi, Budapeŝto V, Lipcsai rakpart 2, Varosi har, lernanto, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.

Emilo Klamert, Budapeŝto VIII, Prater str. 46-1-8, deziras interŝanĝi papermonon, insignojn, poŝtkartojn ilustr., leterojn, poŝtkartojn, kaj Esp. gazetojn.

S-ro L. Naray, Kispeszt (Hungario), Kossuth-Lajos-u. 30, deziras korespondi pri socialismo kaj laborista movado, per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

Erich Gleis, Breslau 15 (Germ.), Goethestr. 67, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtkartojn.

Familio Max Hofmann, Chemnitz (Germ.), Nordstr. 5 Eg, deziras korespondi per poŝtkartojn ilustritaj kun sepa-taga geadventistoj de ĉiuj landoj.

Varsovio, Polio, str. Zlota 51, s-ro Konstanty Chmielewski, deziras interŝanĝi kun diversaj esperantistoj tiujmondaĵ. Kiu sendos al mi diversajn poŝtkartojn militajn, ricevos de mi rekomence diversajn neuzitajn kartojn ilustritajn.